

Heinrich Heine,
Du fratoj

tradukita de Manfredo Ratislavo

Sur la monta pint' situas
Noktvelite la kastel';
Sed envale triste bruas
Fulmaj glavoj en malhel'.

Estas fratoj batalantaj
Furioze en duel',
Per la glavoj sin batantaj.
Kial tiu ĉi kverel'?

La kverelo incendiĝis
Per rigardo de grafin';
Ambaŭ arde enamiĝis
Al la bela nobelin'.

Sed al kiu el la fratoj
Ŝia kor' alturnu sin?
Cerbumado ne, nur battoj
De la glav' decidis ĝin!

Estas ili skermadantaj
Furioze kontraŭ sin.
Gardu vin, ĉar kaŝ-irantaj
Fi-demonoj trompos vin!

Ve, vi sangaj uloj frataj!
Ve, vi sang-avida val'!
Ambaŭ estas mortigataj
De la aliula ŝtal'.

Forbloviĝis la jarcentoj
Post terura la duel';
Entombiĝis multaj gentoj,
Ruiniĝis la kastel'.

Sed en jena val' senbrua
Dum la nokto demonar'
Ĉirkaŭiras, je l' dekdua
Ekbatalas la frat-par'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Zwei Brüder” de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-01-27.*

MR-119-1 / Arg-213-420 (2004-03-14 13:39:35)

La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Junaĝaj suferoj – romanoj“, n-ro III.